

Bolanta Kaldrono



INFORMILO 281
de la Esperanto-Grupo Bremen



oktobro—decembro 2006

Prezidanto: OstR i.R. Hellmut Grebe, Tel: 0421 396 34 80 hellmut.grebe@web.de

Sekretario: D-ro Hans-Walter Krüger, Dordrechter Str. 36, 28259 Bremen,
Tel: 0421 56 19 43. hw.krueger@nord-com.net

Kasistino: Ruth Bohn Tel: 0421 3 82 715

Red. Dieter Hartig, August-Hagedorn-Allee 55, 28279 Bremen.

Nia kunvenejo: **Waller Heerstr 58**. Atentu pri la granda indiko sur la montrofenestro: **"HOKI 58"**! Per tio ni mencias ankaŭ, kie la anoncita programo okazos.

(Aŭtoparki eblas ankaŭ ĉe la "Kino 46")

En 2006 ni festas la

2006 feiern wir das

100-jaran jubileon

100-jährige Jubiläum

de la Esperanto-Grupo Bremen.

der Esperanto-Gruppe Bremen.

Aldone al la profesta publikaĵo ni prezentas nian

Zur Festschrift präsentieren wir unseren „Bolanta Kaldrono“,

“Bolantan Kaldronon”, la kvaronjara informilon.

unser vierteljährliches Informationsblatt..



Informieren Sie sich über Esperanto in Bremen
mittels der oben erwähnten Anschriften.

Informiĝu pri Esperanto en Bremen per
la supre menciitaj adresoj, aŭ per vizito en interreto :
www.esperanto.de/bremen

Nia programo

La 13-a de septembro je la 20-a horo en nia kunvenejo.

La lasta kunveno antaŭ nia festaranĝo.

Die letzte Zusammenkunft vor unserem Fest.

Sub gvido de nia grupestro Hellmut Grebe ni traktos niajn farojn, por

Unter Leitung unseres Gruppenleiters Hellmut Grebe behandeln wir unsere Vorhaben, damit

ke ni travivu feliĉan kaj dignan jubilean feston.

wir ein glückliches und würdiges Fest erleben.

La 28-an kaj 29-an de oktobro: Ni centjariĝas !

Ni antaŭĝojas nian jubileon kaj esperas, ke estos feliĉa festo

Wir freuen uns schon auf unser Fest und hoffen, dass es ein glückliches Fest sein wird

kune kun niaj ĝeamikoj.

zusammen mit unseren Freunden.

La 15-an de novembro je la 20-a horo en nia kunvenejo.

Estos certe trankvila grupvespero kun raportoj kaj rememoroj pri nia.

Es wird sicher ein ruhiger Gruppenabend werden mit Berichten und Erinnerungen an unser

jubileo. Ĉiu aldonu siajn travivaĵojn

Jubiläum. Jeder steure seine Erlebnisse bei.

La 13-an de decembro. Nia Zamenhoffesto 2006.

Ni kunvenos kaj festos la tradician Zamenhoffeston. Invitas nin kaj aranĝos

Wir treffen uns und feiern das traditionelle Zamenhoffest. Es laden uns ein und arrangieren das Fest:

la feston Dagmar kaj Hellmut Grebe.

Dagmar und Hellmut Grebe.

Ni kune kantos, babilos kaj ĝuos la trinkaĵojn kaj frandaĵojn.

Wir werden zusammen singen, uns unterhalten und die Getränke und Leckereien genießen.

Mallonge: Ni travivu feliĉan vesperon.

Kurz gesagt: Wir erleben einen glücklichen Abend.

Venu ek de la 19-a horo

Kommt ab 19 Uhr.

Anoncu vian partoprenon. Bremerhavener Str, 112.

Tel.: 0421 39 63 480

Retrospegulo



Grupvespero la 10an de majo ni kunvenis en nia kunvenejo.

Hg

Ni kunvenis por denove trakti nian 100-jaran jubileon. Hellmut Grebe bonvenigis la membrojn kaj instigis al kontrolo de la ĝis nun farita laboro.

Dek membroj kunvenis. Kontrolcele Hellmut prezentis la provizore aranĝitan aliĝilon kaj la festeldonon, kiu ankaŭ jam estas preskaŭ preta.

Atente ĉiu okupiĝis pri la diversaj temoj kaj laŭ la reagoj ni konstatis, ke niaj membroj fruktodone kunlaboris. La plej diversaj temoj surtabliĝis : Kiam kion fari / pri la manĝadoj/ la tranokteblecoj/ la dimanĉaj entreprenoj, kaj multaj aliaj demandoj.

La kunveno estis sukcesa. Ni decidis pri la plej gravaj demandoj kaj interkonsentis pri preskaŭ ĉiuj programeroj.

Nia ekskurso al Rechtenfleth la 17an de junio

Hg

La agrabla vetero invitis ekskursi. Hellmut Grebe kunprenis siajn disĉiplojn per sia aŭto. Estis agrabla veturo tien tra la bela Weser-regiono.

Ĉe la renkontloko antaŭ la Hermann-Allmers-Muzeo jam atendis partoprenantoj, precipe el la grupo Unterweser. Kune kun tiu grupo la kunesto estas ĉiam agrabla – tia estis ankaŭ la bonveniga ceremonio. Al la ekskurso partoprenis 22 Esperantistoj.

La muzeo, en kiu Hermann Allmers vivis, havas tre belan, flegitan ĝardenon. Bedaŭrinde ni ne havis la okazon rigardi ĝin trankvile.

Ni estis gvidataj tra multaj ĉambroj, kiuj estis ankoraŭ originale ekipitaj per mebloj, tapetoj kaj skulptaĵoj. La klarigoj superŝutis nin, tiel ke estis necese poste klarigi iom.

Sekvis agrabla migrado sur la alta digo. Oni povis vidi grandan distancon trans la Weser kaj la plata regiono. Dum la irado estis bona okazo paroli kun iu kaj tiu. Ni tre ĝojis pri la evoluo de Esperanto en la regiono Unterweser.

En loka restoracio ni trinkis kafon kaj manĝis kukon aŭ eĉ delikate kovritajn buterpanojn. Videble estis ĉiu kontenta kaj utilis la lastan tempon babili antaŭ la fino.

Ni adiaŭis kun antaŭĝojo pri la sekvonta revido, eble dum nia ĝardenfesto sekvontmonate. Dankon al Hellmut Grebe pri tiu bela aranĝo.

Nia tradicia ĝardenfesto la okan de julio



La vetero ne povis esti pli bona: la suno brilis super nia ĝardenfesto. Ruth Bohn invitis kaj atendis nin. Alvenis 14 partoprenantoj, inter ili kvin membroj de la grupo Unterweser. Ni kore bonvenigis ilin, ĉar ni volonte estas kune kun anoj de la najbara grupo.

La laŭbo jam estis okupita, kiam la lastaj membroj alvenis kaj la rostforno jam estis uzpreta. Hellmut, kiu evidente tre ŝatas tiun okupon, jam metis viandaĵojn sur la roston.

Plej bonvenata estis la Krüger-familio. Iliaj kvinjaraj ĝemeloj tuj sentis sin hejmece en la beleta ĝardeno.

Ruth aranĝis ĉion tre komferte kaj evidente ĉiu ĝuis tiun tre agrablan etoson. La ĉeestantoj babilis vigle aŭ manĝis la rostitajn viandaĵojn kaj delikatajn salatojn. Kelkaj rigardis promene la belan ĝardenon.

Tro rapide pasis la tempo adiaŭi.

Dankon, kara Ruth, pro via lerta aranĝo kune kun via afabla fratino.